# SVISA ESPERANTO - SOCIETO

## INFORMAS

N-ro 4/1995 JULIO-AŬGUSTO

REMEMORO:
Nuntempe, 50 jarojn post la fino de la dua mondmilito, la homoj ĉie en la mondo feste rememoras tiun eventon, pensante samtempe pri la multaj viktimoj kaj detruoj. Dum multaj jaroj mi havis germanan korespondamikon. Li estis bona poeto. En ĉiu letero li aldonis memverkitan poemon. En la sekvantaj linioj li priskribas la perdon de sia tuta domo: -FL-

**R E M E M O R O**

Ankoraŭfoje mi per paŝoj pezaj
Reiras al la monto de rubaĵo.
Salutas min murrestoj jen enmezaj,
Ruinoj de iama posedaĵo.

Ĉi tie ludis iam la infanoj,
En ĉiu ĉambro estis ĝojo riĉa.
Jen sidis mi, - la plumon en la manoj, -
Jen estis mi la reĝo revfeliĉa.

Ho, kiom amis mi etaĵojn ĉiujn,
La kunligitajn firme al la koro!
Neniam rericevas mi objektojn tiujn,
Al mi ja restis: Nur la rememoro. - -

Silentas nun la rondo ruinara,
Nur malproksime sonas urba bruo.
Ĉi tie estis mia hejmo kara - -
Kaj en la domo estis ĝoj' kaj ĝuo. - -

La karaj arboj portas foliaĵon,
En la ĝardeno brilas bela floro.
Rigardas mi iaman posedaĵon,
Al mi sed restis: Nur la rememoro! -FHB-

oo0oo

## GRUPAJ INFORMOJ

**BELLINZONA:**
Ni kunvenas ĉiam sabate en Viale Motta 32:
8.7.17.00h kaj 12.8.17.00h

**ESPERANTO-SOCIETO BERN:**
En restoracio AL FORNO, Spitalgasse 37.
4.7.19.30 kaj 8.8.19.30h

ESPERANTORONDO BIELO:
En restoracio AMI, Freiestrasse 8.
ĉiun vendredon 18.00-19.00h-

**ESPERANTO-SOCIETO "LA STELO" GENÈVE:**
Ni ferias ĝis la 8-a de septembro.

**LUCERNA ESPERANTO-SOCIETO:**
12.7.14.00-16.00 paroliga kunveno en Big Ben. Gvido Franz Brügger.
24.8.20.00h Monata kunveno en restoracio Simplon: Diskuto pri la uzo de tempo:
a) ĉu ni donu al la vivo pli da....
b) kial ni havas desmalpli da....?
Parolos Sonja Brun.
13.9.14.00-1600 en Big Ben kiel supre.
28.9.20.00h Raportoj pri la UK en Tampere,Finnlando

**ESPERANTO-SOCIETO NEUCHÂTEL:**
ĉiumonate iun vendredon, laŭ ebleco de la membroj.

**ESPERANTOKLUBO WIL:**
12.7: Promenado al DREI BRUNNEN.
En aŭgusto ne okazos kunveno.

---

Informo pri Esperanto-Staĝoj en Francio (departemento Hérault) apud la Mediteranea Maro, dum 1995:
Montpelliera kultura Esperantocentro organizas internacian Esperantosemajnon en Sète, havenurbo situanta 30 km sudokcidente de Montpellier, de la 2a ĝis la 9a de septembro 1995. Vi povos ripozi, bani en la Maro, viziti vidindaĵojn, travivi internacian etoson, manĝi bongustaĵojn, eklerni la internacian lingvon aŭ perfektigi vian konon, ĝui agrablan etoson. Informas Yvette Vierne, 5 Rue du docteur Roux, 34000 Montpellier Francio. Tel:33 67 54 15 43.

-YV-

**LA REGIONA SEMAJNFINO DE SVISA ESPERANTO-SOCIETO OKAZOS LA 9-an kaj 10-an de SEPTEMBRO 1995 en CULLY,** ĉarma vinbera vilaĝo apud Lausanne, ĉe la LEMANO.

**GEORGES LAGRANGE,** Tradukisto kaj verkisto, prelegos pri:

**"MIA GRAMATIKO"**

- Esperanto, lingvo facila, sed kial tiel fuŝata?!
- Pri la movo (ne la movado!)
- Ĉu ekzistas konjugacio en Esperanto?
- Kio estas "IĜI"?
- Kaj aliaj problemoj...

Tiu prelego koncernas ĉiun Esperanto-parolanton, lertan aŭ ne, ĝi permesos pliboniġi sian lingvon, sed ankaŭ pripensi kelkajn gravajn punktojn de nia lingvo, laŭ la vidpunkto de unu el la plej bonaj tradukistoj en nia lingvo kaj fama verkisto de pluraj Romanoj.

Paralele: **GRUPO DE KOMENCANTOJ,** gvidata de **Lucienne dovat,** kaj de **PROGRESANTOJ** kun **CLAUDE GACOND.**

DISTRA VESPERO: **ELEKTITAJ REPLIKOJ POR ELEKTITA PUBLIKO,** Nova spektaklo. **ANDRES BICKEL.**

**ALIĜILO** kun pli detalaj informoj estos sendata al ĉiu membro de SES. Pliajn informojn: Nicole Margot, Lys 4, 1010 Lausanne, Tel: 021 653 14 67. -NM-

ooOoo

## JARA RAPORTO POR 1994 DE LA ESPERANTO-SOCIETO NEUCHÂTEL

Ni kunvenis dek fojojn dum la jaro 1994, ĉe la prezidanto en Chez-le-Bart. Ni kutime kunvenas vendredon po unu fojon monate.Kiel ni kutimas dum multaj jaroj, ni korektas hejmfaritajn tradukojn (elfrance-esperanten, preparitajn de sinjoro R.W. Perrenoud, kiun ni kore dankas. Ni ankaŭ diskutas ĉefe en kaj pri Esperanto.
Kelkaj el ni partoprenis, la 11-an de oktobro, funebran kulton pri la morto de pastoro Edouard Waldvogel, en la templo "La Maladière" en Neuchâtel.Pastoro Jean Rodolphe Laederach, ankaŭ Esperantisto, parolis interalie pri la aktiveco de Edouard Waldvogel por Esperanto, kaj diris la preĝon "Nia Patro" en Esperanto.
Edouard Waldvogel, kiu mortis tre aĝa,multe suferis dum siaj lastaj jaroj. Mi memoras lin kiel tre afablan homon kaj, se mi bone memoras, mi aŭdis lin prediki dum Universala Esperanto-Kongreso. Ni pensu kun dankemo al li.
Plue kiel kutime, ni festis la naskiĝdatrevenon de Zamenhof.
Raporto kaj kasraporto (R.W. Perrenoud) akceptitaj. Adreso de la Prezidanto: Alfred Wenger, En Séraize 19. CH-2025 Chez-le-Bart, tel 038/55 25 20. -Alfred Wenger-

oo0oo

**RIMARKO:** Estis demandoj el la membraro, kial SES INFORMAS ne raportis pri la **Seminario en Luzern.** La Revuo LITERATURO FOIRO de februaro 1995, sur paĝo 51, bone raportis pri tio, kaj tiun revuon ricevas ja ĉiu SES-membro. -FL-

oo0oo

**Itala Interlingvistika Centro**
**Kooperativo de Literatura Foiro**
**Triesta Esperanto-Asocio**
**bonvenigas al la**

## 4ª MEDITERANEA KONFERENCO DE ESPERANTOLOGIO

**en Triesto, 28-31 oktobro 1995**

**dediĉita al la temo**
***La Esperanta leksikografio: problemoj terminologiaj kaj frazeologiaj***

**la aktualigo de Plena Ilustrita Vortaro**
**la ĵusa aperigo de esperanto-vortaroj**
**franca / itala / germana**
**la pretigo de aliaj**
**(bulgara / hispana / hungara)**
**la frazeologiaj demandoj**
**la fakaj terminaroj**
**la rolo de niaj lingvaj institucioj**
**kaj tiel plu**
**estos traktitaj de aŭtoroj kaj fakuloj**
**dum ĉi tiu unika konferenco**
**pri la farado de vortaroj**
**en nia lingvo**

**loĝiga servo kaj postkonferenca turisma programo:**
**Triesta Esperanto-Asocio**
**via Crispi 43, I-34131 Trieste (Italio)**

PS: Aliĝilo ricevebla ĉe la redakcio de SES INFORMAS, Wiesliacher 17, 8053 Zürich.

# I N V I T O


al la 3-a **INTERNACIA KULTURA KAJ TURISMA**

**E S P E R A N T O - S E M A J N O**

4-a ĝis 11-a de novembro 1995 en

**S A L O U**

KATALUNIO HISPANIO



**Sub aŭspicio de HISPANA ESPERANTO-MUZEO**

Detalaj informoj kaj aliĝilo estas riceveblaj ĉe la redakcio de SES INFORMAS

**ESPERANTO EN LA FORUMO PRI VIRINOJ DE NE-REGISTARAJ ORGANIZOJ en PEKINO 1995.**

La forumo okazos de la 29-a de aŭgusto ĝis la 8-a de septembro 1995. En la sama kadro okazos ankaŭ la 4-a U.N. Monda Konferenco pri Virinoj. En tiu-ĉi forumo partoprenos ĉ. 25000 virinoj el la mondo kaj diskutos virinajn problemojn. Tamen diskutoj ne ĉiam glate iras pro lingva barilo kaj estas multaj, kiuj rezignas partoprenon pro lingvaj malfacilaĵoj. Esperantistinoj en Japanio planas enketi la partoprenantojn de la forumo pri lingvaj problemoj/malfacilaĵoj en komunikado kaj havi laborkunsidon per Esperanto, de la 30-a de aŭgusto ĝis la 3-a de septembro 1995. Se vi Esperantistinoj,interesiĝas pri la agado, aliĝu al la forumo kaj kunlaboru. Vi ricevas necesan informon por aliĝo de

AIHARA misako
3-15-13 Tuga
Ùakaba-ku
Tiba-si, Japanio

oo0oo

**11-a E K U M E N A - K O N G R E S O**

**49-a de IKUE 45-a de KELI**

**31 Julio - 7 Aŭgusto 1995**

**en Kaunas, Litovio**

**PS:** Informoj kaj aliĝilo riceveblaj ĉe la redakcio de SES INFORMAS, Wiesliacher 17 CH-8053 Zürich. -FL-

oo=oo

AZB
8053 Zürich

PP/Journal
8053 Zürich

IMPRESSUM
Mitglieder-Information Schweiz. Esperanto-Gesellschaft
Aufgeber: Fritz Liechti Wiesliacher 17 8053 Zürich
Herstellungsort: Druckerei Gysin Zürich. 6x im Jahr.
Red. Telefon 01/381 77 13

**1 9 9 5 : La Europa naturprotekta jaro:**

1970: unua granda paŝo: "La naturprotektataj teritorioj".
Antaŭ 25 jaroj la Eŭropa Konsilantaro entreprenis sian unuan kampanjon por la konservado de la naturo per: ĝi klarigis al la homoj en Eŭropo la gravecon de la naturprotektado. Tiu-ĉi kampanjo ebligis al la Eŭropa konsilantaro flegi intimajn rilatojn al landoj de meza kaj orienta Eŭropo. Estis la komenco de kreado de naturprotektataj regionoj, kaj proklamis la jaron 1995 **"DUA EUROPA NATURPROTEKTA JARO".**
Sekve de tio la Svisa Registaro entreprenas specialan klopodon akceli la protekton de la multflanka varieco da specioj. Por konkretaj naturprotektadaj projektoj estas je dispono 3.75 milionoj da frankoj.

Informoj ĉe:
Europäisches Naturschutzjahr ENSJ'95
Sekretariat c/o naturaqua, Elisabethenstr.51
3014 Bern. Tel: 031 331 38 41.

oo0oo

**Limdato por kontribuaĵoj al SES INFORMAS 4/95 estas la 7-a de aŭgusto 1995.**

oo0oo